# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban - 66-PERPIGNAN (P.-O.) - Telefono 34-38-84

Jara Abono : 3 F. - C. C. P. 956-28 Montpellier

N° 35 ------------ -------- 2a Trimonato 1970 ----

## GRAVAJ ESPERANTISTAJ RENKONTIĜOJ

La dimanĉon, 26-an de aprilo, okazos en Perpignan la jara Kongreso de la Esperanta Federacio " Languedoc-Roussillon". Jen estas la antaùvidota programo :

- Je 10 h 30 : Labora kunveno ĉe la Metia Ĉambro 35 quai Vauban, sub la prezidanteco de S-ro René LLECH-WALTER.
- Je 12 h 30 : Komuna manĝo ĉe la restoracio de " La Loge " apud la Urbdomo de Perpignan.
- Je la 3-a posttagmeze, okazos prelego pri " Finlando, la lando de la 60.000 lagoj ". Tiu prelego estos prezentota de ge-roj BENAZET el Argelès-sue-Mer per tre belaj diapozitivoj.

Por pli ampleksaj informoj kaj aliĝoj, sin turni al S-ro René LLECH-WALTER, 5 Quai Vauban 66 PERPIGNAN. Tel: (69) 34.38.84.

De la 27-a ĝis la 29-a de junio okazos en JACA (Hispanujo) ĉe la Internacia Universitato, Hispana-Franca Renkontiĝo. Por klarigoj kaj aliĝoj, sin turni al F-ino Inès GASTON, Sekretariino de Hispana Esperanto-Asocio, P° Marina Moreno, 35 - ZARAGOZA-

R. LLECH-WALTER.

oooooo
oo

## DEPARTAMENTA FEDERACIO "GARD".

La ĝenerala asembleo okazis dimanĉon la 15an de februaro en Alès (Komunuma Kultur-Centro). Temis ĉefe pri uzo de la subvencio kaj intensigo de nia propagando. Fine de majo aù komenco de junio ni aranĝos departamentan kaj regionan renkontiĝon en Sommières, kio obligos al ni konigi al la enloĝantoj, de tiu pitoreska urbeto ke Esperanto ekzistas kaj vivas.

oooooo
oo

## VIVO DE LA GRUPOJ

ALES

La Verda Stelo. La unuan semajnon de junio, nia grupo prezentos al la publiko la belegan ekspozicion de nia amiko Lentaigne "Le livre Esperanto".

NIMES

Se la unua veno de F-ino Kimie OZAWA la 28 kaj 29-ajn de decembro ne tre bone sukcesis (multaj anoj forestis ĉu pro la libertempo, ĉu pro malsano) la 2a ĉeesto de nia ĉarma japana kamaradino plene trafis sian celon.

Gravan intereson naskis ne nur ĉe la esperantistoj, sed ankaŭ ĉe la aliaj la elmontrado de la kalkulaparato (=Sorobano). Dank'al tiu allogo, la gazetistoj akiris samtempe la pruvon de taŭgeco de nia lingvo.

Tre favoraj artikoloj, ĉiuj ilustritaj de foto, aperis sur la tri regionaj gazetoj (Midi-Libre, la Marseillaise; le Meridional).

Plie, la lasta el tiuj, post kelkaj tagoj aperigis longan artikolon pri esperanto kaj pri la aktiveco de nia grupo.

Ankoraŭfoje ni povis konstati, ke la veno de alilandano multe helpas por la disvastigo de nia lingvo.

La estraro de la turisma oficejo, favore impresita pro la sukceso de la esperantista faldprospekto pri Nimes, kies unua eldono estis rapide elĉerpita, ne nur reeldonis ĝin pli grandkvante kaj ilustrite, sed ankaŭ planas eldoni alian faldprospekton pri la departemento.

La kurso pro la du deĵorantinoj de la turisma oficejo bone daŭrigas.

F-ino Marjolaine Schlumpf, filino de nia fidela ano trapasis post nur ok monata studado la atesto pri lernado kaj brile sukcesis ( mencio "bone").

+++++
+

MONTPELLIER

Kunvenoj : Unuan lundon de la monato ĉe :
Foyer d'Accueil du Mas de Tesse 1574 Rue de las Sorbes je 20 h 30.
C.C.P. : N° 1.487-48 centre de Montpellier
Groupe Esperantiste de Montpellier.

Sidejo : 5 Rue Docteur Roux.

Post Japanino, vizitis nin Svedo kaj Nederlandanino. Dum du monatoj Greet BOKHORST, juna esperantistino de Rotterdam, loĝas en Montpellier por perfektigi sian konon de la franca lingvo.

Ne utile diri ke ŝi venis en nia urbo dank'al esperanto.

Cotisations : Les retardataires peuvent envoyer leurs cotisations au C.C.P. du groupe.
- Cotisation à U.F.E. 30F. (Membre simple 6F/)
- Cotisation à U.E.A. avec abonnement à Esperanto : 46F.
  sans abonnement à Esperanto : 23F.

+++++
+

BEZIERS

La grupo multe aktivas por la S.A.T. Amikara Kongreso. Pro tio kaj ankaŭ pro gripo ne estis multaj lokaj kunvenoj aŭ agadoj. Tamen la kursoj daŭre okazas kaj la gelernantoj serioze laboras. Celo : Atesto pri lernado.

Okaze de la kongreso venos germanaj amikoj kiuj restados 20 tagojn. Ili vizitos la urbon kaj la regionon. La grupo akceptos ilin dum vespero. Ni deziras por ili belan veteron kaj agrablan restadon.

+++
+

NARBONNE

La Narbona Grupo, dum la lasta trimonato, partoprenis en la organizado de la komitata kunveno de la Federacio "Languedoc-Roussillon), kiu okazis en la narbona Junuldomo.

Okaze de tiu kunveno, partoprenis komitatanoj kaj aliaj esperantistoj el diversaj regionoj de la Federacio.

Eĉ du ne esperantistinoj el Beziers kiuj komencas lerni koresponde, kaj lernanto de la nuna kurso en Narbono partoprenis la kunvenon, sub la prezidanteco de Sinjoro LIECH-WALTER. Dum la tuta tago kaj la tagmanĝo en la restoracio de la Junuldomo, plej bona estis la etoso, kaj bona laboro estis farita.

Krome, la narbona grupo kunvenas regule ĉiu-monate, ĝia kurso bone funkcias kaj kunvenigas ĉiu-semajne, ok lernantojn, junajn kaj malpli junajn. Ĉiuj estas laboremaj kaj bone lernas, je la granda ĝojo de ilia kursgvidanto.

+++
+

ATENTU !

Une circulaire d'U.F.E. vient d'être adressée à toutes les fédérations. Cette circulaire est un véritable cri d'alarme sur la situation financière de l'Union Française pour l'Esperanto.

Ceux qui auront étudié avec soin le raport financier paru dans Franca Esperantiste auront peut-être constaté d'eux-mêmes.

Ceci nous amène à faire les remarques suivantes :

-1° Les membres qui ne paient que la cotisation de Membre Adhérent 6F. ne reçoivent pas Franca Esperantiste, donc risquent de ne pas être informés.

- 2° Beaucoup de membres qui payaient la cotisation Membre Titulaire : 30F. ont payé cette année la cotisation Membre Adhérent : 6F. Pour chaque membre la perte financière est donc de : 24F. partagés entre la fédération et l'U.F.E. N'est-ce pas grave ?

A noter que les cotisations à U.E.A. ne rapportent rien à U.F.E. et à la fédération.

ooo

Federacio "Gard"

Ni petas niajn anojn kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon bonvole kvitiĝi sendante 5 F. al Fédération Départementale du Gard C.C.P. Montpellier 185-07. Ili ricevos " Sud Franca Stelo" DANKON.

## RAPORT FINANCIER

| | Recettes |
|---|---|
| En Caisse au 1er Janvier 1970 : | 676,28 |
| Fédération | 136,50 |
| U.F.E. | 952,00 |
| U.E.A. et autres | 708,50 |
| Abonnement Bulletin | 229,50 |
| Commandes | 78,00 |
| Total des Recettes | 2780,78 |

| | Dépenses |
|---|---|
| Cotisations | 1972,00 |
| Bulletin | 262,90 |
| Propagande | 16,50 |
| Manifestations | 63,00 |
| Frais Secretariat | 47,48 |
| Commandes | 78,00 |
| Total des Dépenses | 2439,88 |

Excédent de Recettes au 31 Décembre 1969 :

2780,78 -
2439,88
0350,90

- - -

Ceci est le compte-rendu financier officiel qui rapporte toutes les opérations effectuées.
Mais il faut remarquer que seules les recettes : Fédération et Abonnement au Bulletin sont de vraies recettes. Les autres correspondent aux sommes qui ont simplement transitées par le C.C.P. de la Fédération.

L'Excédent de recettes 1969 est en principe le bénéfice de la Fédération accumulé sur plusieurs années. En réalité une partie de cette somme correspond à des recettes " transitaires" qui étaient encore en caisse au moment de la clôture des comptes.

Pour cette même raison l'excédent de recettes au 31 décembre 1969 ne reflète pas forcement la situation exacte.

Aussi faut-il remarquer que au moment de la "Komitat-kunveno" en Octobre à Vergèze, l'en-caisse était de 400F. environ, et à la dâte du 27 février 1970 de 432F. Si cette dernière somme est supérieure à celle de 350,90 au 31 Décembre 1969, cela vient de ce que beaucoup de cotisations ne sont rentrées qu'après le 1er Janvier 1970.

Le Trésorier : ANGEVIN.

UTILECO DE DELEGITOJ EN URBOJ KIE LOĜAS ESPERANTISTOJ.

Svedo por sia laboro trapasis du tagojn en Montpellier, do unu nokton. Kion fari vespere ? Li rigardas la jarlibron kaj konstatas kun ĝojo ke estas esperantistoj en la urbo. Li telefonas al unu, demandas ĉu eblas renkonti esperantistojn .... La unua esperantisto telefonas al aliaj, alia vizitas najbarojn aŭ survojanojn. Post unu horo 7 esperantistoj gaje babilas inter ili, unu Svedo, unu Nederlandanino, unu novbakita lernanto kiu konstatis la utilecon kaj agrablecon de esperanto.

Kio estus okazinta se nur la jarlibro ne estus delegito en Montpellier ?

oooo
ooo
o

IIa FRANCA-HISPANA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

27-29 Junio 1970 Jaca Hispanujo

Mi aliĝas al la Internacia Renkontiĝo en Jaca samtempe sendas la kotizon por la diversaj aranĝoj :

Nomo kaj kompleta adreso ..........................................
...................................................................
...................................................................

Dimanĉon la 28-an
Kompleta tuttaga aranĝo, 250 ptoj ................................

Lundon la 29-an
Tuttaga ekskurso al OZA, 250 ptoj.................................
Loĝado en Universitata Restadejo 185 ptoj tage ....................


Entute ............................................

Dato ............................ Subskribo .......................

Kiuj ekskursos al OZA per propra aŭtomobilo devos pagi nur 150 ptojn, anstataŭ 250 ptojn.

Aliĝon kaj monon oni sendu al Inès GASTON
Paseo Marina Moreno, 35 4° ZARAGOZA - Hispanujo -

Roneotypé par la Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon
Directeur de la Publication : Frus Roberto N° 996 Bat 2 M
ZUP de NIMES.
Dépot légal 2ème Trimestre 1970.


esperanto
renkontiĝas nin!!! Kune
samideanono el malproksima lando
de la Leviĝanta suno en nian
tutan regionon.
R.F.